



N-ro 158 - JUNIO 1999 (2)

# La Migranto



# La Migranto

Ligilo de la Esperantistaj Naturamikoj  
Eldonita kun aprobo kaj interkonsento de la Naturamika Internacio

**Eldonanto:** TANEF

**Apermonatoj:**  
marto, junio, septembro, decembro

**Redaktofino:**  
ĉiam la 1an de la antaŭa monato

**Naturamika Internacio - NAI**  
ĝen. sekretario: Manfred Pils  
Diefenbachgasse 36, A 150 Wien, Aŭstrio

**Internacia fakreferanto:** Bert de Wil  
Houtvaartkade 21, NL-2111 BR  
Aerdenhout, Nederlando

**Sekretario TANEF:** René de Clerck,  
Pastoor Vandenhoutstr. 39, BE-2950,  
Kapellen, Belgio

**Ĉefredaktorino:**  
Antje Noordewier-Jagtenberg  
Kon. Emmalaan 7, NL-3832 AH Leusden  
Nederlando

**Redaktoroj:**  
Karin Lencki  
poŝtfako 2004  
DE-21239 Buchholz, Germanio

Erna Döring, Postfach 225,  
CH-4003 Basel, Svislando  
Pri artikoloj, kiuj estas signitaj,  
la aŭtoroj mem respondecas.

**Kasistino - abonanto-administracio:**  
Aad Dermendaal-ŝof Brouw  
Ĝirkonto poŝtbanko Amsterdamo  
nr. 7543982 sub la nomo "La Migranto"  
Dirkslandhof 18, 3086 CC Roterdamo  
Nederlando  
UEA konto tanf-a  
Seoble pagu al via kanta peranto.  
La adreson vi trovas ĉiutage sur la koloraj  
paĝoj en la 4a numero de "La Migranto".  
Jarabono NLG 16,50

**Presado kaj dissendado:**  
Abel Lingboek, Fogetsanghstate 4,  
NL-7608 HJ Almelo, Nederlando

Ĉi tiu gazeto estas presita sur medioatubla  
papero, blankigita sen kloro.

## Ricevitaj gazetoj, revuoj. k.a.:

Sennaciulo (SAT) 1999/2,3,4.  
Esperanto (UEA) 1111,1112,1113.  
Esperanto 94 La Verda Stelo 74-75.  
Norvega Esperantisto 1999/1-2.  
Internacia Fervojisto 1999-2  
SAT-Amikaro 538,539,540.  
La Verda Proleto (SATEB) marto 1999.  
La Internaciisto (KEK) 1999/2.  
Trefo, bulteno de Trentha 1999/1  
Aŭstria Esperanto Revuo 1999/1-3  
SLEA Informilo Aprilo 1999.  
Internationale Informationen Esperanto-Freunde Aŭstrio 1.  
Franca Esperantisto 505  
SAT-ADRESARO 1999/2000.

Kun kora danko ni kvitanas jenajn donacojn:  
en nederlandaj guldenoj  
M.v.d. Berg, den Helder 3.50  
en svisaj frankoj  
W. Berli, Zürich 2,50 · E. Bretscher, Winterthur  
7,50 - H. Gerhard, Bassersdorf 2,50 - G. Keller,  
Zürich 1,00 - A. Kessler, Zürich 7,50 - F.  
Liechli, Hettlingen 2,50 - H. Macher, Zürich  
7,50 - F. Pisciani, Minusio 2,50 E. Rohner,  
Schlieren 7,50.

## ENHAVO

Diskuto pri la celoj kaj rimedoj de TANEF . . .	3
Plena suneklipso . . . . .	4
Nia amiko Max Finkensteller el Vieno . . . . .	6
Nova kursejo/gastejo en Svedio	
Esperantogarde . . . . .	7
Klimatsanĝ(i)go: ĉu katastrofo aŭ beno? . . . . .	8
La TANEF-jarkunveno pri la jaro 1998 . . . . .	10
Nova verda longmarŝo . . . . .	11
Esperanto en la hungara telefonlibro . . . . .	11
Hospitalo por bestoj . . . . .	12
Fabriko lau ekologiaj principoj . . . . .	13
Eŭropo en internacia festivalo . . . . .	13
Internacia kongreso de naturamikoj en Blankenberge . . . . .	13
Venenado de anseroj en Doñana . . . . .	14
Israelo: la bredado laŭ ritmo de sankta skribo	15

**Bildo sur la frontpaĝo.** foto AL  
En Valoggio sul Mincio (Italio). 8 kilometroj sudon de Garda Lago, troviĝas belega parko kun multaj diversaj arboj, arbustoj kaj plantoj. Oni povas iri nur aŭtomobilo. En la parko situas kelkaj parkejoj kaj promonado la vizitantoj povas ĝui la belecon de la ĉirkaŭaĵo.

## Diskuto pri la celoj kaj rimedoj de TANEF

Laŭ instigo el la pasinta jarkunveno en Krikenhaar, ni foje bone diskutu la celojn de TANEF kaj rigardu ĉu rimedoj estas disponeblaj por realigi tiujn celojn. Tia diskuto bone kon-



gruas kun deziresprimo de la estraro de NAI (vidu la raporton de kunveno okazinta la 16an de januaro en la pasinta numero de La Migranto). Ĉi sube vi trovos tekston en kiu ni provas difini la celojn kaj rimedojn. La teksto estus diskutata dum la jarkunveno de TANEF en la posttagmezo de la 25a de julio en Karlovy Vary. Se vi ne povos partopreni kaj volas reagi, sendu vian reason al la internacia fakreferanto.

TANEF konsistas ĝis nun el grupo de abonantoj kun estraro. La estraro zorgas pri la eldonado de La Migranto kaj ankaŭ povas organizi feriosemajnojn. Sed kio do estas la celoj de TANEF, kiel esperanto-fako de NAI?

### Celoj:

1. Diskonigi esperanton en naturamikaj rondoj, loke (en lokaj grupoj) kaj landskale kaj internaciskale.

*Rimedoj:* faldfolioj nacilingvaj, retpoŝtaj informpaĝoj, anoncoj, intervjuoj kaj artikoloj en lokaj naturamikaj gazetoj. Kunorganizi ekspoziciojn (uzante standon). Atentigoj pri Esperanto-staĝoj en nacia naturamika libreto (franca, ekz.e). Interŝanĝojn stimuli. Internaciskale: ne estas klare kion TANEF povus fari rilate al NAI krom subteni la kampanjojn de NAI pri bluaj riveroj aŭ verdaj vojoj, publikigante materialon en Esperanto aŭ organizante diskutojn pri tiuj temoj.

2. Diskonigi la naturamikan movadon al esperantistoj.

*Rimedoj:* faldfolioj en esperanto, artikoloj/intervjuoj, informkunveno dumkongrese, utiligado de esperanto por interŝanĝoj (vizitoj reciprokaj). Interret-paĝo. Feriosemajnoj.

Demando: ĉu vi opinias ke tiel la ĉefaj celoj de TANEF estas bone priskribitaj?


Ĉu vi havas rimarkojn pri la rimedoj? Aldonoj, kritikoj?

Kompreneble oni ne povas ĉion samtempe fari, tio ankaŭ dependas de la kapabloj kaj entuziasmo kaj tempodisponeblo de plej diversaj homoj. Sed eble estas inter la abonantoj de La Migranto homoj kiuj havas specialiajn ideojn kaj proponojn pri difinita temo.

La 11-an de aŭgusto 1999:

## PLENA SUNEKLIPSO

Je merkredo, la 11-a de aŭgusto venonta, en okcidenta kaj meza Eŭropo multaj okuloj ĉirkaŭ tagmezo estos direktitaj supren por observi (tra specialaj okulvitroj!) la malantaŭ la luno malaperantan sunon. En tiu tago la ombro de la luno kun rapideco de 3300 km po horo (en okcidenta Eŭropo) glitos super longa zono de la tero, de la Atlantika Oceano (300 km sude de Nova Skotlando apud Kanado) ĝis la Bengala Golfo. La larĝeco de la zono kie la eklipso estos plena, varios. En Eŭropo ĝi estos proksimume 100 km. Je ambaŭ flankoj de tiu zono etendos sin ankoraŭ multe pli larĝa strio kie la eklipso estos nur parta.



La kovrita sundisko kun la luma korono.

La eklipso de la 11-a de aŭgusto komenciĝos en la Atlantika Oceano je la 9h31m (UTC), glitos super la oceano, super la sudokcidenta parto de Anglio, super norda Francio, suda Belgio, suda Luksemburgio kaj suda Germanio, meza Aŭstrio, meza Hungario, suda Rumanio kaj norda Bulgario, la Nigra Maro, nordorienta Turkio, kaj super partoj de Irako, Irano, Pakistano kaj Hindio. Ĝi finiĝos en la Bengala Golfo je la 12h36m (UTC). Do estos

vere internacia evento! Multaj profesiaj kaj amatoraj astronomoj kaj aliaj interesiĝantoj vojaĝos al la zono kie la eklipso estos videbla.

Kelkaj tempindikoj de la komenco de la maksimumo de la eklipso en Eŭropo en UTC; por MEST aldonu du horojn:

Plymouth 10h13m, Le Havre 10h19m, Rouen 10h20m, Reims 10h25m, Luksemburgo 10h28m, Strasburgo 10h31m, Karlsruhe 10h32m, Stuttgart 10h33m, Augsburg 10h36m, Munkeno 10h37m, Salzburg 10h40m, Linz 10h43m, Graz 10h45m, Szeged 10h53m, Arad 10h56m, Timisoara 10h56m, Bukareŝto 11h06m, Diyarbakir 11h39m.

Ekster la zono de la plena eklipso situas ekzemple Amsterdamo (maksimumo je 10h27m, 91,9% kovrita); Berlino (maksimumo je 10h40m, 87,2% kovrita), Berno (maksimumo 10h29m, 91,7% kovrita), Bruselo (maksimumo 10h26m, 97,4% kovrita), Prago (maksimumo 10h42m, 94,0% kovrita) kaj Vieno (maksimumo 10h46m, 99,2% kovrita). Tie do nur parto de la sundisko estos kovrita.

Oni ne rigardu suneklipson per la nudaj okuloj, nek per binoklo aŭteleskopo. Okuloj pro tio difektiĝas. Oni nepre uzu specialajn okulvitrojn por protekti la okulojn dum la observado de la eklipso.

Dum suneklipsoj suno, luno kaj la tero estas en unu linio. Suneklipsoj ĝenerale ne estas maloftaj. En jaro okazas meze 2-3 suneklipsoj. Sed ĉiu eklipso estas videbla nur en parto de la tero. La ombro de la luno ne povas kovri la tutan teron.

Oni distingas tri tipojn de eklipsoj: plenaj eklipsoj kiam la tuta sundisko estas kovrita de la luno, partaj eklipsoj kiam la suno estas nur parte kovrita de la luno, kaj ringformaj eklipsoj kiam ringforma parto de la suno restas nekovrita. La diferencon inter plenaj kaj partaj suneklipsoj klarigis al la tiam naŭjara verkinto de ĉi tiu artikolo antaŭ pli ol 55 jaroj la fama dana astronomo Ejnar Hertzsprung (1873-1967), tiam direktoro de la astronomia observatorio de la universitato de Leiden (Nederlando).

La eblo rigardi plenan suneklipson ne estas ofta. Lastfoje en (norda) Eŭropo okazis plena eklipso je la 22a de julio 1990, videbla en partoj de Finnlando kaj de tiama Sovet-Unio.

Plena suneklipso estas la plej impona fenomeno en la ĉielo, kiun homo povas travivi. Rigardante (atentu: nur tra specialaj okulvitroj!) al la suno oni povas vidi la varmegan eksteran atmosferon de la suno (la t.n. koronon), la sundisko malaperas, ekregas mallumo, steloj estas videblaj, la temperaturo malaltiĝas, birdoj eksilentas. Laŭdire tio postlasas impreson kiun oni memoras sian tutan vivon.



*Proksimuma zono de la plena suneklipso je la 11a de aŭgusto 1999*

En pasintaj tempoj tiu fenomeno por la homoj ofte estis teruriga. Ekstis timo pri katastrofo, pri la fino de la mondo, en iuj landoj kaj iuj tempoj oni pensis ke la suno estis vorata de monstro. Nun ni scias ke la suno post kelkaj minutoj denove aperos. La astronomoj eĉ povas antaŭdiri precize kiam eklipsoj okazos kaj kie ili estos videblaj.

Supozeble multaj gelegantoj de La Migranto havas intereson rigardi la feno-

menon. Ili eluzu la nunan okazon, car la plej proksima eblo denove vidi planan suneklipson estos je la 29a de marto 2006 en Turkio!

Notoj:

- MEST estas Mezeŭropa Somera Tempo
- UTC (Universal Time Coordinated) estas la tempo de la meridiano de Greenwich (GMT), t.e. Mezeŭropa Somera Tempo minus 2 horoj.

Fontoj:

- J.Kuiper/H. Otten: Zonsverduistering. De eclips van 11 augustus 1999. Hago 1999.
- H-U. Keller: Kosmos Himmelsjahr 1999. Sonne, Mond und Sterne im Jahreslauf. Stuttgart 1998.
- C. A. Ronan: De amateurastronom. (The Practical Astronomer). Trad. en la nederl. lingvon de J.F.M. Jacobs. Ede 1982.

Karlo de Bruin

## ***Nia amiko Max Finkenzeller el Vieno.***

Multaj Esperantistoj konas nian Max Finkenzeller el Vieno. Mi notis kelkajn faktojn el lia interesa vivo pri kiuj li rakontis.

Max naskiĝis je la 9.9.1905 en kamparana regiono de Supra Aŭstrio. Jam kiel 13-jara knabo li devis labori 2 jarojn ĉe kamparano. Post ĉi tiu malfacila tempo li ekhavis laboron en la vitro-fabriko en Schneegattern kie li konatiĝis kun la ideoj de la socialdemokratoj kaj naturamikoj. Li estis en la fabriko konfidulo por la junaj kunlaborantoj.

Dum la tempo ĉe la aŭstria armeo li lernis la profesion de elektromekanikisto. Post la armea tempo li estis dum multaj jaroj sen laboro. Dum la milito li devis labori en Germanio kaj ankaŭ militservi.

Post la milito en 1945 li venis al Vieno kaj aliĝis la Naturamikojn. Tie

li fariĝis skiinstruisto kaj gvidis 20 jarojn la "vienajn arbarajn skikursojn" de la Naturamikoj. En 1951 li estis membro de la komitato en Innsbruck, kiu petis pri agnosko de Esperanto ĉe la Naturamika Internacio. Dum kongreso en Hamburgo 1953 oni akceptis Esperanton ĉe la internacia organizaĵo de Naturamikoj.

En Vieno li ankaŭ gvidis Esperantokursojn kaj ankoraŭ nun li estras la grupon de Esperantisto-naturamikoj. Kvankam li jam havas 94 jarojn li vizitas ankoraŭ SAT- kaj UEA-kongresojn. Li ankaŭ gvidas Esperantistojn, kiuj venas al Vieno en la kadro de la "Monda Turismo" tra Vieno.

Ni deziras al nia amiko Max, ke li restos tiel vigla kiel ĝis nun ankoraŭ tre, tre longa!

Anton Straif, Aŭstrio.

## ***Nova kursejo/gastejo en Svedio*** ***"ESPERANTOGÅRDEN".***

### **Situo:**

"Esperantogården" situas en Lesjöfors, loko en la provinco Vermlando en meza Svedio. Laŭdire tiu estas la plej bela provinco en Svedio kun multe da lagoj, betularbaroj sed ankaŭ pingloarbaroj (kun trojoj, diras kelkaj). Estas la provinco de "La fabelo de Gösta Berling", la konata libro ankaŭ tradukita esperanten, de Selma Lagerlöf. Ŝia hejmo, Mårbacka, estas nuntempe ŝatata ekskursloko.

Lesjöfors estas atingebla per aŭtobusoj de Stokholmo, Gotenburgo, Oslo kaj de aliaj lokoj en Svedio. Fervoje ne plu eblas, sed kombino de fervojo kaj aŭtobuso. Pri tio bonvolu peti informojn. La plej proksima urbo estas Filipstad.

### **Iom pri Esperantogården:**

Kiel ni povis ĝin akiri estas interesa, sed iom longa historio. Pri la domo mem: ĝi enhavas 23 ĉambrojn, 88 litojn (pliajn oni povos aranĝi), konferencejon, kuirejojn, unu por memkuirado, k.a. Tio signifas ke ni povas proponi ĝin kiel konferencejon al societoj kaj kluboj. Por pli grandaj aranĝoj ni kunlaboras kun lokaj organizoj kaj hoteloj.

Ni fondis kooperativon, kie la investpartoj kostas po 100 Skr-oj. Ankaŭ

eblas tutsimple donaci monon. Pli ol 200 personoj kaj kluboj jam investis kaj ankaŭ sufiĉe multaj donacis praktikan laborkapablon dum la rekonstruaj laboroj kaj en la kuirejo dum esperantoaranĝoj.



### **Vizitu Esperantogården!**

Por ekhavi monon ni kunlaboras kun la sveda turisma asocio STF kaj do invitas kiu ajn tranokti tie laŭ la reguloj por migrulhejmo aŭ junulargastejo por tre modestaj prezoj. Paŝigi sian libertempon tie povos esti agrable, ĉar estas multo por fari kaj vidi tie. Vi povas promeni, libere aŭ laŭ markitaj ŝpuroj; vi povas kanoti, bani vin en la lagoj, kolekti berojn kaj fungojn kaj vintre skiveturi, eĉ estas tie slalomejo. Kaj se vi ekz. ŝatas labori en la ĝardeno, vi ankaŭ rajtas tion. Do, venu por ĝui agrablan restadon en "Esperantogården"! Vi ankaŭ rajtas membriĝi.

## Klimatŝanĝ(iĝ)o: ĉu katastrofo aŭ beno?

Kio estas "normala" klimato?

Klimato povas esti karakterizita kiel la longtempe averaĝaj veteraj cirkonstancoj (temperaturo, pluvo, sun-(UV-)radiado).

Por scii kio estas normala klimato, oni devas mezuri. Tiam oni povas fari komparon inter la nuna kaj antaŭa situacioj.



Fakte oni nur de 200 jaroj havas – almenaŭ en okcidentaj landoj – mezuritajn temperaturojn, pluvofalojn, k.s. El antaŭaj tempoj oni nur povas deĉifri la klimaton el jarringoj de arbotrunkoj, el sedimentoj (sur la fundo de la maro kaj en lagoj) kaj el glaci-kernoj de glaĉeroj (ekz.e en Grenlando, Antarktiko). Ankaŭ el skribitaj informoj el antaŭaj tempoj oni povas konkludi ke kelkfoje la temperaturo estis unu aŭ du gradojn pli alta aŭ malpli alta ol nun.

En la 17a–18a jarcentoj la klimato estis relative malvarma kompare al nun. La vintroj pli severaj, la someroj malpli varmaj. Sed en la Mezepoko, la temperaturo kontraŭe estis pli alta.

Do, eĉ en relative mallonga periodo de kelkaj jarcentoj, la klimato povas ŝanĝiĝi sufiĉe. Esploroj pri glacikernoj el Grenlando montris ke eĉ en kelkaj jardekoj la temperaturo povas rapide "salti" plurajn gradojn.

Ĉio dependas do de la periodo kiun oni konsideras, ĉu oni povas konkludi ke la nuna plialtiĝo de la averaĝa monda temperaturo – 0,5–0,6 gradoj Celsiusaj kompare al 1860 – estas jam signifa aŭ ne. Se oni konsideras la lastajn 150 jarojn tiu plialtiĝo ja ne estas statistike signifa.

Ideoj pri klimatŝanĝiĝo tra la jarcentoj.

Ĉar klimato estas afero kiun homo ne povas influi, ekestis jam en la komenco de la skribita historio ideoj pri kio kaj kiu influas la klimaton. Abundas la religiaj klarigoj por klimatŝanĝ(iĝ)o. La Biblio parolas pri sep jaroj da abundo kaj sep jaroj da malabundo, pri la Diluvo k.t.p. La klimato do estas konsiderata kiel la rezulto de "la mano de Dio". En paganaj kulturoj la sorĉistoj kaj ŝamanoj provis per siaj ritoj influi la diojn kaj spiritojn kiuj kaŭzis pluvon aŭ sekecon. Eĉ en la jaro 1997 post uragano en Alabamo, Usono, dum dua Paska tago, la lokaj ortodoksuloj estis firme konvinkitaj pri tio ke Dio punis la homojn, ĉar ili malfermis siajn butikojn dum la Unua Paska tago...

Sed estis ankaŭ diversaj ideoj pri klimatŝanĝo pro modernaĵoj. En



Svisio ekz.e en 1816 oni eĉ kulpigis la relative novajn fulmokondukilojn pri (malbona) efiko al la klimato. Dum la sesdekaj jaroj la nukleaj proveksplodoj estis konsiderataj kiel kaŭzoj de malbona vetero. La superpersonaj aviadiloj ankaŭ estis de kelkiuj konsiderataj kiel perturbantoj de la klimato, ĉar ili flugas alte en la atmosfero kaj tie ellasgasoj havas pli da influo (kondensiĝokerno).

La forhakado de tropikaj arbaroj ne estas nove eltrovita argumento, ĉar jam en la pasinta jarcento la brita kaj germana parlamentoj debatis pri la eventualaj sekvoj por la klimato de grandskalaj senarbarigoj (cetere ideo, kiu praviĝis, ĉar forigo de arbaroj havas gravan influon al la klimato).

Oni ne nur havis ideojn pri klimatsanĝo ligitajn al malbonaĵoj. Pluraj scienculoj en sciencoptimisma arogo antaŭ la unua mondmilito jam sugestis ŝanĝi la Golfo-fluon trans Atlantikon, tiel ke ĝi atingu pli nordajn havenojn (Norvegio, Ruslando). En Sovetio oni planis ŝanĝi la fluon de Siberiaj riveroj, supozante ke tio donos pli da akvo al la dezertecaj regionoj kie oni kultivas kotonon (kio kaŭzis sekiĝon de Aral-lago). La inĝeniera menso ankaŭ pripensis metodojn por produkti pluvon dum sekeca periodo: ŝuti jodkristalojn en nubetojn, tiel helpante la formiĝon de pluvonuboj. Ĝus oni povis legi pri simila ideo en Meksikio, kie oni volas produkti jonigitan aeron per radiado fare de antenoj specialaj super urbaj regionoj.

La ideo pri klimatsanĝiĝo pro troa



produktado de karbondioksido ( $\text{CO}_2$ ) jam datiĝas el la fino de la 19a jarcento (de sveda scienculo Arrhenius), sed daŭris ĝis la tridekaj jaroj antaŭ ol oni komencis paroli pri tio. En la tridekaj jaroj oni jam konstatis averaĝan temperaturplialtiĝon de kelkdekonoj de grado. Sed fine de la tridekaj jaroj, la klimato denove plimalvarmiĝis, do la ideo esti forlasata.

Nun tiu ideo estas apogita de sciencularo en Internacia Panelo pri Tutmonda Klimatsanĝiĝo, kiu konsilas al Unuiĝintaj Nacioj. La konkludo en diversaj raportoj (el 1990 kaj 1996) estas ke la temperaturplialtiĝo ĝis nun plej verŝajne estas atribuebla al la troproduktado de  $\text{CO}_2$ . En Kioto, 1997, UN faris decidon pri malaltiĝo de la elĵeto de industria  $\text{CO}_2$  (kaj poste oni decidis pri la procentaĵoj por diversaj landoj).

Oficiale akceptita do estas la hipotezo pri la forceja efiko, sed tio ne signifas ke ĝi estas science pruvita. Tio fakte ne eblas, ĉar ni estas parto de la eksperimento kaj estas multaj faktoroj kiuj influas.

Tamen aliaj klarigoj por la plivarmiĝo ankaŭ havas siajn adeptojn. Ekz.e la

teorio pri la sunmakuloj. La intenseco de la sunmakuloj varias kaj laŭ cikloj de 11 jaroj. Danaj scienculoj en la 90-aj jaroj sugestis belan korelacion inter la temperatura kurbaĵo kaj la intenseco de la sunmakuloj. En kelkaj landoj nuntempe la scienculoj estas konvinkitaj pri tio ke kaj la sunmakula intenseco kaj CO<sub>2</sub> kune povas bone klarigi la observitan temperaturpliatiĝon (kiu ne estas rekta linio cetere) dum la pasintaj 150 jaroj.

Kelkaj scienculoj jam havas belan teorion pri la influo de kosma radiado al la tera atmosfero kaj la rilato kun ciklonoj kaj anticiklonoj. Sed eĉ se oni trovas belan korelacion, tio ne signifas ke estas kaŭza rilato, ĉar en okcidentaj landoj la nombro da cikonoj ja malkreskis paralele al la nombro da novnaskitaj homoj....

Teorio pri klimatinfluo fare de la homo kiu jes povis esti pruvita estas la detrua efiko de freonoj (el ŝprucflakonoj, fridujoj, k.s.). Jam en la sepdekaj jaroj Usonaj scienculoj avertis pri la ebla detruado de la stratosfera ozontavolo fare de tiuj freonoj, fluorklorkarbonidoj. Nur en la 80-aj jaroj oni povis konstati la "truon" en la ozontavolo super Antarktiko, ĉar antaŭe la programoj de la mezursatelitoj estis tiel faritaj ke la nekongruaj mezuraĵoj estis forĵetataj...

En la fino de la okdekaj jaro Nobel-premiito Paul Crutzen faris la teorion kiel la ozonmolekuloj estas detruitaj per UV-radioj, la KFKoj (liberaj kloratomoj) kaj glacikristaloj de altaj nuboj.


B. de Wit

(daŭrigo en venonta numero)

## La TANEF-jarkunveno pri la jaro 1998.

Nia TANEF-Jarkunveno okazos ĉi tiun jaron dum la 72-a SAT-Kongreso en la ĉeĥa banurbo Karlovy Vary (1999-07-24/31).

La urbo Karlovy Vary situas okcidente de Prago apud la limo kun Germanio, dum la antaŭkongresurbo situas sude de la ĉefurbo Prago, sojle al la protektita teritorio Ŝumavo, proklamita de la Naturamika Internacio kiel "Eŭropa pejzaĝo 1999/2000".



Sanatorio

Ĉiuj aliĝintoj ricevos precizajn indikojn, kiel atingi la lokojn. La kontaktadreso por informoj kaj por sendi aliĝilojn: KAVA-PECH, Petro Chrdle, Anglicka 878,CZ-25229 Dobrichovice, Ĉeĥio. Tel:+420.2.99112201, fakso:+420.2.9912126, rete: chrdle@kava-pech.cz  
HejmpaĝoTTT:<http://www.kava-pech.cz/>.

Se vi volas nur viziti la jarkunvenon, vi estu bonvena. Por tranokti vi direktu vin al la supra adreso.

## ***Nova verda longmarŝo***

Ok ĉinaj Esperantistoj ekmarŝas tra Azio kaj Eŭropo.

Je la 9-a horo de la 1-a de januaro 1999 en la Kontenera ŝipkajo de la havenurbo Lianyungang, la orienta komencpunkto de la Nova Azio-Eŭropa Kontinento-Ponto en Ĉinio okazis solena starto-ceremonio. La kuraĝuloj, kunportantaj sur la brustoj signojn de Esperanto, kun la verd-stela flago, levante la manojn ĵuris firman decidon pri plenumo de la transjarcenta turisma "Nova Verda Longmarŝo". Post kiam 150 geknaboj kunludante marŝmelodion per trumpetoj kaj tamburoj oferis al la ok kuraĝuloj freŝajn florojn kaj ruĝajn koltukojn, ili ekmarŝis sub la verd-stela flago.

La ceremonion ĉeestis la gvidantoj de la Lianyungang-urba registaro, la havena Kompanio, la urba sporta komitato, Eduka komitato, Soci-sciencia Ligo, la urba kaj provinca Esperanto-Asocioj.

La karavano transmarŝos 11 000 km-ojn dum 20 monatoj laŭ la Nova Azio-Eŭropa Kontinento-Ponto, Azio-Eŭropa Fervojo trans sep landoj: Ĉinio, Kazaĥio, Rusio, Belorusio, Pollando, Germanio kaj Nederlando ĝis la urbo Roterdamo, la fina okcidenta punkto de la Nova Azia-Eŭropa Kontinent-Ponto. Je la nula horo de la 1-a de januaro 2000 ili atingos la limon de Azio kaj Eŭropo ĉe la Ural-Montaro en la rusa urbo Jekaterinburgo. En aŭgusto de la jaro 2000 ili

atingos la celitan urbon Roterdamo en Nederlando.

La labora lingvo de la karavano estos Esperanto dum la tuta piedira vojaĝo. La celo de la Verda Longmarŝo estas propagandi nunajn ĉinajn ekonomiajn politikojn "Reformo kaj Malfermo", la praktikan realigon de ESPERANTO - INTERKOMPreno - AMIKECO - PACO, akceli la interfluan kaj kunlaboron inter diverslokaj Esperantistoj laŭ la Azio-Eŭropa Kontinento-Ponto en la kulturo kaj ekonomio.

El "Internacia Fervojisto" 1999-2. HAN Juwu, vicprezidanto de la Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio.

## ***ESPERANTO en la hungara telefonlibro.***

Dank'al insisto de Oszkar Princz de la Hungaria E-Asocio, en la telefonlibro de Budapeŝto denove aperis informoj esperantlingve apud la angla, germana, franca, itala kaj rusa. Princz pledis por la aperigo per la argumento ke ne nur temas pri utila helpo al iuj eksterlandaj turistoj sed ke la uzo de Esperanto kontribuas al favora bildo pri Hungario kaj montras konscion pri lingva egalrajteco. Princz aldonis ke "en Hungario ĉ. 50 mil homoj parolas E-on je iu nivelo kaj en la pasintaj 40 jaroj vendiĝis pli ol 20 mil lernolibroj.

Dankesprimojn oni povas sendi al: Magyar Telefonkönyvkiado Kft.-Merkatika Direktoro, Baross u.89, HU-2040 Budaörs, Hungario.

El "Esperanto" 1/1999.

## Hospitalo por bestoj.

Sur la protektata teritorio Poodri de la Odro-regiono en la vilaĝo Bartošovice proksime de la ĉeĥa urbo Ostrava situas stacio por kuraci kaj savi bestojn. La ĉefaj taskoj de la sovaĝbesta hospitalo estas:

- savado de vunditaj aŭ difektitaj sovaĝaj bestoj, ilia flegado, kuracado kaj zorgo por revenigo en la liberan naturon.
- bredado, zorgado de elektitaj specioj kiuj estas krize kaj grave endanĝerigitaj kaj ilia liberigo en la naturon.
- la stacio estas zorgocentro por kontraŭleĝe importitaj aŭ eksportitaj bestoj kaj plantoj kiuj estas leĝe protektitaj.
- la stacio havas samtampe edukon kaj klerigan taskon por eduki homojn pri medioprotektado.

Oficiale fondite en la jaro 1977, ĝi jam efektive komencis funkcii en 1974 kiam oni kuracis handikapitan arbaran buteon. Post mallonga tempo sekvis aliaj, ĉefe rabobirdoj kaj strigoj. Ĝis nun estis prizorgataj pli ol 2500 bestoj el la libera naturo, t.e. 72 specioj da birdoj kaj 10 mamuloj. El ili preskaŭ 80% revenis en la liberan naturon. Raraĵoj en la stacio estis linko akrevida, fiŝaglo kaj iuj akvilegioj (staŭdo el la ranunkolacoj). Meznombro estas ĉiutage ĉirkaŭ 100 ekzempleroj prizorgitaj en la stacio.

El ĉi tiuj samspecaj stacioj en nia lando Bartošovice estas la plej granda el la malgrandaj zoologiaj

ĝardenoj; ĝia surfaco estas 2 hektaroj. Plej ofte la homa agado estas la kaŭzo de la bestaj lezoj. Unue mi nomas kunpuŝigon kun trafikiloj, plie la uzadon de venenaj kemiaĵoj. Gravaj estas ankaŭ la vundado pro la flugo kontraŭ elektraj dratoj alttensiaj kaj difekto de la plumkovraĵo en malpura sendimento. Pafvundado malgrandiĝos pere de pli bona edukado. Plua klerigado estos ĉiam bezonata.



*cikonio blanka*

Lasttempe oni komencis per la bredado. Unue la bredado de la tinunkolo ĝenerala (turfalko). Por tiu celo estas antaŭ ĉio uzataj la daŭre difektitaj ekzempleroj ĉar la tute sanigitaj birdoj estas ellasitaj en la naturon. La daŭre difektitaj restas en la stacio aŭ estos transdonitaj al la aliaj stacioj por bredado kaj dresado. En tiu kampo jam realiĝis la repatriado de sakrofalko - 20 ekzempleroj - al la regiono de Beskydy.

Gravas la ekologia edukado de la publiko, unualoke de la infanoj.

Ekestas malrapide pli humanaj, etikaj kaj ekologiaj sintenado kaj konduto al la libere vivantaj bestoj. En la kadro de esploroj estas plibonigitaj la kuracmetodoj; la trovo kaj forigado de parazitaj ĉe la birdoj; la enkonduko de mikroĉipoj en la korpojn de la bredataj bestoj kaj ilia reago al ili. Oni ankaŭ mezuras la nivelon de fremdaj elementoj kaj registras ilian efikon en la korpo kaj ovojn. Esploru oni preparis la strategion por savu de protektitaj kaj endanĝerigitaj bestoj en mia lando.

Plie la malgranda kolektivo de laboristoj ankoraŭ sukcese plenumis aliajn taskojn, pri kiuj mi ne skribis. Se vi vizitos la regionon Ostravan, ne forgesu viziti ankaŭ Bartošovice!

Jaroslav David. Ĉefio.

### **Fabrika laŭ ekologiaj principoj.**

La entrepreno "Akvoporto Volk", turbinfabriko kaj inĝenieroficejo en Simonswald, Nigra Arbaro, planas la konstruadon de "Futurfabriko". La nova fabriko, kiu situos proksime de la ekzistanta produkto, estas planita laŭ ekologiaj principoj. Akvoportejo kun du turbinoj eluzos la forton de la rivero Elz kaj liveros la tutan kurenton. Sunĉeloj, kolektiloj de sunenergia, garantios la akvovarmigon kaj forbrulaĵo, kiu uzos lignopece-tojn, zorgos por la hejtado. La troan kurenton oni deziras liveri al la publika reto.

Nuntempe 18 kunlaborantoj konstruas malgrandajn akvoportaĵojn, kiuj estas eksportataj al la tuta mondo. Post kiam estos inaŭgurita

la "Futurfabriko", la nombro de la kunlaborantoj estu pligrandigota al 80 personoj.

*Tradukita de Lothar Eckert, Germanio.*

### **Eŭropo en internacia festivalo**

Se vi deziras trapasi la jarŝanĝon en internacia esperanto-etosoj, pripensu partopreni la 16an Internacian Festivalon, kiu okazos en Münster, Germanio, de la 27a de decembro ĝis la 3a de januaro. La festivalo prezentas specifan programon por **mezaĝuloj kaj junaj familioj** kun aŭ sen infanoj.

En la festivalo okazos distraĵoj, sed ankaŭ diskutoj pri la nova monnunuo kiu baldaŭ en Eŭropa Unio estos la sola. Estas ankoraŭ pluraj landoj kiuj deziras aliĝi al tiu "Eŭropa Domo". Kiaj estos la estontaj evoluoj?

Dum la festivalo oni ankaŭ vizitos la nederlandan limurbon Enschede apud Münster. Informojn pri la IF vi povas akiri de Hans-Dieter Platz, Postfach 1148, DE-34303 Nienstein, Germanio. Tel. +49 5624 8007, poŝtelef.: +49 171 4964558.

### **Internacia kongreso de naturamiko en Blankenberge**

Je la 24a ĝis la 26a de septembro okazos la 17a kongreso de la Naturamika Internacio en Blankenberge, Flandrio. En la kongreso kunvenas la delegitoj kaj fakreferantoj. Krom la oficialaj raportoj, diskutoj pri proponoj kaj amendoj, okazos ankaŭ laborgrupoj pri diversaj temoj, i.a. la rolo de Eŭropo en tutmondo, turismo en kunteksto de tutmondiĝo kaj la naturamiko kiel socia kultura forto.

## Venenado de anseroj en Doñana.

Sekreta informo de CSIC (Ĉambro de Sindikato de Inĝenieroj Konsilantaj) tekstas ke la amasa venenado de anseroj en Doñana, la hispana nacia parko, kontagios Skandinavion per pezaj metaloj.


(En "La Migranto 156, septembro 1998, vi povis legi artikolon pri la medio-katastrofo, kiu trafis la hispanan Naturparkon Donaĵan. La grandega barajlago kun toksa akvo de la piritominejo Boliden krevis kaj toksa koto fluis en la parkon).

Nun, kiam la anseroj revenas al Skandinavio post la vintra restado en Donaĵa, informo de CSIC sciigas ke unu el kvin anseroj mortos pro mortiga kvanto de plumbo kaj kadmio kaŭze de la polucio, produktita de la minejo Boliden. Sed pli maltrankviligante estas ke la pezaj metaloj eniros la nutraĵosistemojn de norda Eŭropo. La "Monda Naturfondaĵo/Adena" respondecigas la hispanajn aŭtoritatojn pri la grava kontagado de la anseroj kaj aliaj birdoj, kiuj pasis la vintron en Donaĵa. Multaj el ili mortis dum la migra vojaĝo revene al siaj tradiciaj restadejoj someraj en Danio, Svedio, Finnlando, Germanio kaj Nederlando. La hispanaj aŭtoritatoj kulpas pro la kaŝado de la aŭtentika realo de la problemo anstataŭ ĝustatempe apliki rimedojn por solvi ĝin.

La pumpiloj, kiuj devis provizi per akvo la lagunojn de "Mar Lopez" kaj "El Lobo", ne funkciis sufiĉe bone por eviti ke la birdoj serĉu la nutraĵojn en la poluciitaj zonoj. La studoj montras tre klare, kiel la proporcio de la poluciaĵoj en la sango de la diversaj birdoj plimultiĝis pro la nefunkciado de la pumpiloj. Nun, kiam la katastrofo de Boliden atingas multajn aliajn landojn eŭropajn, ni esperas ke la aŭtoritatoj hispanaj sin

sentu pli devigataj por agadi pli respondece.

La duono de la ĉirkaŭ 50 000 anseroj, kiuj en 1998/1999 travintris en Donaĵa, estas grave kontagitaj de plumbo kaj kadmio, unu el kvin bestoj prezentas en sia sango koncentriĝojn kiujn oni konsideras mortigaj. Ili havas ankaŭ altajn koncentriĝojn de zinko kaj kupro. Ĉi tiuj informoj baziĝas sur kontroloj realigitaj la pasintan someron en Svedio kaj nun en Donaĵa. En aŭgusto 1998 oni kaptis kelkajn dekojn da anseroj, vivantaj en Norvegio, Svedio kaj Danio por havigi specimenojn de sango kaj analizi ĝin. Oni intencas daŭrigi ĉi tiujn analizojn en la nordo de Eŭropo kaj en Donaĵa dum almenaŭ kvin jaroj.



La CSIC estas premata mildigi la publikan prezentadon de ĉi tiu informo, do eble la kontrolado de la kontagitaj bestoj spertos malfacilaĵojn. La Monda Naturfondaĵo/Adena petis al la skandinavaj aŭtoritatoj ke ili ne ĉesu siajn esplorojn kaj realigu novajn analizojn por havigi pruvojn nerefuteblajn. La manko de adekvata agado de la hispanaj aŭtoritatoj plimultiĝos la mortadon de la anseroj, kiuj krome reproduktiĝos malpli kaj ankaŭ ilia migrado ne estos tiom nombra. La kvanto da anseroj

**ISRAELIO:****La bredado laŭ la ritmo de la sankta skribo.**

*Por ke la bibliaj leĝoj kongruu kun la bredado, la religiaj kibucoj montriĝas elturniĝemaj.*

Vendrede vespere ĉe la kibuco "Ein Zurim", ĉiuj klopodas por digne prepari sin por la ŝabato: oni alivestiĝas, la domoj estas puregaj, oni fumas la lastan cigaredon, oni programas la horloĝon kiuj ekfunkciigos la elektron, la virinoj akurate finkuiras la kukojn por la semajnfino. Jen aperas la ŝabata stelo: neniu laboro ĝis paso de 24 horoj! Nek kuiru, nek skribi, nek lavi, nek fumi, nek telefoni, nek vojaĝi, nek ekbruligi fajron aŭ ŝalti la lumon.

"Ein Zurim" estas unu el la dek ses religiaj kibucoj en Israelio kaj, ĉirkaŭataj de siaj ses infanoj, Esther kaj Schmulick akceptas nin en sia hejmo. Antaŭ ol iri al la manĝosalono komuna al la tuta kibuco, Esther antaŭzorgas doni al mi fulardon por ŝirmi miajn harojn kaj Bruno kapvestas sin per kipo, la judara ĉapeto. "Por ne ŝoki iujn personojn" ŝi precizi-

gas. Post la vespermanĝo, niaj gastigantoj montras al ni kiel meti la vazaron en la lavkuvojn disigante tiujn kiuj entenis viandon disde tiuj en kiuj estis servitaj la fromaĝo. Efektive la juda tablo apartigas la karnajn manĝojn de tiuj kiuj konsistas el laktaĵoj, starigante inter ili limon laŭ jena principo: "Ĉu ni kuro la kapridon en la lakto de ĝia patrino?" (Eliro 23-19).

Tiel, la tutan vivon de la enloĝantoj de "Ein Zurim" reguligas la bibliaj instruoj. "Ni kredas ke ĉio estis skribita de la rabenoj en Talmudo kaj ni devas observi ĝiajn leĝojn se ni volas vivi kiel judoj obeantaj Dion", klarigas Schmulick. Publikigita en la jaro 999 a.K. en la religiaj akademioj el Babilono, la Talmudo regas ĉiujn aspektojn de la ĉiutaga vivo. Tiel same ĝi traktas filozofion, kiel la edukon de l'infanoj.

Iuj izraelfanoj riproĉas al la religiuloj, ke ĉi tiuj same vivas kiel antaŭ dumil jaroj. Unuavide, fondita en 1946, la kibuco "Ein Zurim" kun sia moderna uzino, siaj hangaroj ŝirmantaj agrokulturan materialon ultraperfektigan kaj siaj agrablaj dometoj ĉirkaŭataj de ĝardenoj, neniel aspektas kiel vilaĝoj el la biblia epoko. Ĉirkaŭ kvincent personoj venintaj de dudek kvin landoj komune vivas tie, egalece dividante siajn havaĵojn kaj la fruktojn de sia laboro.

Sed ne ĉiam estas facile kombini la leĝojn de la Talmudo kun la postuloj de la moderna ekonomia vivo. Tiele la ŝabato starigas kelkajn problemojn al la agrikulturistoj. Forpuŝante ĉiajn ajn zorgojn, la homo devas dediĉi tiun tagon al sia Dio, al sia familio kaj ĉia ajn laboro estas malpermesita. Sed se la tero povas atendi, la bestoj bezonas zorgadon. La

malpliigiĝis en la nordo kaj tiuj, kiuj alvenis, kunportos altan gradon de kontaĝo. Ekzistas grava risko ke la pezaj metaloj el Boliden/Donaña miksiĝu en la nutrado-sistemojn de ĉi tiuj malproksimaj regionoj.

El la revuo "Panda". Luis Serrano Pérez. Hispanio.

*Noto de la tradukinto: Malgraŭ la esperoj de la naturdefendantoj, la minejo "Boliden" (nederlanda kapitalo) rekomencis la laborojn je 5-4-1999. Tri cent laboristoj reprenis sian laboron, la aŭtoritatoj ne sentis sin pretaj daŭre pagi subvencian al tiuj laboristoj.*

L.S.P.

tracent bovinoj de "Ein Zurim" ne estas escepto, necesas ilin melki kiel kutime, tri fojojn tage.

"Kompreneble ni melkas la bovinojn dum la ŝabato ĉar la Talmudo ne suferigas la bestojn, tion ni faras laŭ maniero konforma al la Leĝoj". Por la melkado la agrokulturistoj renkontis problemon pro la fakto ke al ili estas malpermesate premi la ŝaltilon por produkti elektron. Tial ili ekipis sin per programeblaj horloĝoj kiuj ĝustatempe startas la melkomaŝinojn kaj aŭtomate haltigos ilin.

"Ĉiun virseksan unuenaskiton de cia bovino aŭ ŝafo vi dediĉos al cia Dio JAVE-O. Ci ne laborigos la unuenaskiton de cia bovino. Ci manĝos ĝin kun ciaj samhejmanoj..." Tiel parolas la biblia libro Deŭteronomo (15-19) por sciigi al la homoj kiuj plugas, semas, kultivas kaj fieras pri sia rikolto, ke sen Dio nenio el tio eblas. Sed ĉiujare en la stalo de "Ein Zurim" naskiĝas centoj da unuenaskitaj bovidoj. Kion fari el ili? La rabenoj trovis solvon: la bovinoj kiuj naskos sian unuan bovidon en la jaro estas fiktive venditaj al araba najbaro (ĉi tiu ricevas monsumon por efektiviĝi la "negocon"). Ili restas en la kibuca stalo sed ne plu estas submetataj al la talmudaj leĝoj.

"Pesah", Pasko, estas unu el la gravaj momentoj de la juda vivo, memoriganta la Eliron el Egiptio de la israelidoj sub la gvidado de Moseo. Tiun semajnon antaŭas intensa purigado de la domo por kontentigi la absolutan postulon de pureco dum la festo. Dum sep tagoj oni konsumos nur panon sen gisto, ne fermentitan, simbolo de la renoviĝo kaj de la liberigo. Ĉar la bestoj estu regataj de la samaj reguloj, la melkadejo estas ĝisfunde purigita kaj oni malaperigas ĉiun spuron de tritiko el la nutrado de la bovinoj. "Iom post iom ni anstataŭigos per maizo, komencante la transiron ĉirkaŭ tri



*La bredado laŭ la ritmo de la Sankta Skribo*

semajnojn antaŭ Pesah kaj grade revenos al la normala lakto-produktokvanto. El tio ni perdas monon sed tio estas la prezo kiun ni konsentas pagi por vivi harmonie kun nia kredo", klarigas Schmulick.

Ĝisfunde frontantaj la teknikon kaj la rendimenton, ili tamen neniam forgesas la vivregulojn de siaj praaĵoj, akordigante spiritan vivon kaj laboron: iliaj tagoj ĉiam komenciĝas kaj finiĝas en la sinagogo.

Maryvonne Robineau, Francio.

*La kibucoj.*

*Dum la unua kibuco estis fondita en 1910, ekzistas nuntempe 270 kibucoj nombrantaj de 40 ĝis pli ol 1000 membrojn. 130 000 personoj, nome 2,6 % de la tuta enloĝantaro de Israelio elektis tiun komunuman vivmanieron.*

**Por scii pli pri tiu eksterordinara aventuro, unu libro:**

**"Ili vivis sur la tero.**

**Ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo"**

240 paĝoj-8 paĝoj kun koloraj bildoj.

Havebla ĉe UEA aŭ Bruno Robineau · 49270 Landemont · Francio. Tel-Faks 02 40 98 78 76 - E-poŝto: Bruno.Robineau@wanadoo.fr  
120 FF + sendokostoj: 20 FF por Francio 30 FF por aliaj landoj.